

# La Progreso

REDACTIE-  
COMITE

G. P. DE BRUIN  
G. J. DEGENKAMP  
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL  
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.  
Postgiro 331133

W. F. KRUIT  
H. KUYT  
JAC. LEM JR.  
H. VAN LIER  
J. VAN SCHEEPEN  
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

## ESENCO DE LITERATURO

G. Brugman

Antaŭ ĉio ni bezonas scii la signifon de la vorto „literaturo”. Por ekscii kiun signifon ĝi havas en la komuna lingvo, ni povas konsulti vortaron. Laŭ P.V. oni nomas literaturo:

1e, la tuton de la spiritaj verkoj kiuj koncernas la vivon kaj kulturon de iu nacio aŭ epoko kaj

2e, la tuton de la verkoj, presaĵoj k.t.p. pri iu temo.

En la verketo de k-do Degenkamp „Gvidilo por la studado de la Esperanto-literaturo”, oni trovas, ke literaturo estas:

1e, la arto skribe esprimi la homan penson en formoj kiel eble plej belaj kaj

2e, la tuto de la literaturaj produktoj de la homaro aŭ de aparta popolo.

(Mi atentigas ke la lasta citaĵo estas tradukita, do ne laŭvorta).

Cetere la diferenco inter la difinoj konsistas ĉefe en tio, ke k-do D. evidente pensis precipe pri beletro, pri tiu speco de literaturo, en kiu la aspiro al belo okupas la unuan lokon. Ni nun proksimume scias, pri kio temas. Sed ni deziras pli. La cititaj difinoj konigas al ni nur la eksteran, la krudan aspekton de la ideo, pro kio en la ordinara parolo ni povas distingi ĝin de aliaj konceptoj. Sed nin interesas la vera esenco de literaturo, la fundamentaj premisoj de ĝia estiĝo, la internaj fortoj, kiuj kaŭzis ĝian evoluon; por mallonge diri: ĉio kio estas en ĝi implikita.

Ĝenerale kiam ni parolas aŭ aŭskultas, ni ne konscias la fakton, ke la uzitaj vortoj estas nur la tradiciaj simboloj de ideoj kaj nepre ne la ideoj mem. Aŭdante la vorton „literaturo” oni

apenaŭ imagas la konturon de la ideo, kia ĝi esprimiĝis en la ĵus menciitaj difinoj. Kaj same estas pri multegaj aliaj vortoj.

Ni povas konkludi el tio, ke por esprimi ideon en ĝia tuta amplekso ĝenerale ne sufiĉas unu sola vorto; plej ofte ni bezonas por tio plurajn frazojn, iafaĵe eĉ kompletajn artikolojn aŭ verkojn. Kaj fine tamen povas resti ankoraŭ hiatoj. Sed ju pli profunde ni sondas la esencon de la ideoj, des pli klaran komprenon ni akiras pri iliaj interrilatoj, kaj tio ja estas la celo de ĉiu konscia spirita aktiveco.

La origino de la homa pensado perdis en la nebuloj de la pasintaj jarcentoj. Tamen ĝi estas pli malpli fidele rekonstruebla per tio, kion oni observas ĉe la disvolviĝo de la aparta individuo. La evoluo de la individuo ja estas kvazaŭ mallongigita ripeto de la evoluo de la tuta speco.

Nu, se ni iras returne en nia memoro, ni enpenetras ian ŝakton, pli kaj pli mallumiĝantan.

Ĉe la komenco de nia vivo regas kompleta spirita mallumo. Ĝi daŭras kelkajn jarojn, dum kiuj iom post iom elvolviĝas la kapabloj por vidi, aŭdi, palpi, gusti, flari kaj . . . memori.

Ĉi tiuj funkcioj komunikas al la cerbo la unuajn impresojn, kiuj pere de la memoro fariĝas la ĝermoj de estontaj ideoj. La ekaperado de ideoj enkondukas fine la formiĝon de la konscio, tiu mensa stato, pli aŭ malpli luma, laŭgrade kiel la ideoj kristaliĝis, kiu estas la ĉefa karakterizaĵo de la matura homo.

Analoga al la skizita evoluo de la individuo estis do la evoluo de la tuta homa speco:

## KONTRASTAJ KONKLUDOJ

Bone legi libron estas iasence arto: sed legi ion, kio nenie estas skribita, estas eĉ pli ol arto!

En „Esperanto 60 jara” mi menciis sur pĝ. 16a la fakton, ke Zamenhof komence ofte uzis adjektivon en esprimoj, en kiaj li poste preferis adverbon. Jen kelkaj tiaj frazoj: „Por mi persone estus kompreneble multe pli oportuna teni la sorton. . . .; tute ne estas postulata, ke. . . .; ĉar krei ilin mem ne estas permesita; Schleyer ne trovis necesa fari. . . .” Mi komentis ilin, dirante: „Pro kio Zamenhof poste preferis la adjektivan formon, ni ne scias”. (Laŭdire de Beaufront konsilis al li uzi adverbon.) Personan opinionon pri uzo de adjektivo aŭ adverbo mi nenie diris en la libreto.

En sia recenzo pri la libreto Kalocsay argumentas en „Literatura Mondo”, ke la adjektiva formo estas korekta, sed la adverba simple eraro. Kaj li aldonas: „Zamenhof kaj Kabe sciis tion, la aŭtoro, bedaŭrinde, ne scias.” El kio K. konkludas tion? Mi nur konstatis la dumanieran uzadon de Z., ne dirante kiu el ambaŭ formoj miaopinie estas korekta! Tamen, K. diras, ke mi prenis de ie regulon, ke la koncernata vorto devas esti adverba!

Antaŭhistorio: kompleta spirita malumo.

Prahistorio: sentumaj impresoj, memoro. Historio: formiĝo de izolaj konfuzaj ideoj pri objektoj kaj agoj, poste pri kvalitoj kaj rilatoj; iom-post-ioma konsciigo.

Sendube la homoj jam frue eltrovis la eblon interkonigi siajn impresojn pere de sonoj. La efiko estis duobla. Kreiĝis tiel lingvoj utilaj por la interkomunikado kaj (kaj jen la plej grava sekvo) tiuj lingvoj montriĝis krome bonegaj iloj por la disvolvo de la penskapablo mem.

Sen vortoj, sen simboloj la sentado devis resti pasiva, ĥaosa, nedistingiĝa, sed helpe de ili ĝi aktiviĝis, povis sin objektivigi, esprimi sin kaj jam pli malpli klare difini sian enhavon. Ankaŭ la memoro plifaciliĝis, kaj veraj pensoj komencis aperadi. La vojo al lumo estis trovita.

Estas vere, ke tiu ĉi vojo montriĝis kruta, dornoplena, malfacile irebla kun multaj sakvojoj kaj temporabaj kurbigoj, ke ĝi ofte ŝajnis ia labirinto, en kiu oni frekvente eraris, sed malgraŭ ĉiuj malhelpoj la irantoj per konstanta penado ĉiufoje denove sukcesis levi sin

Kontraŭ tiu recenzo ni metu la sufiĉe malican opinionon de Waringhien en „Sen-naciulo”, en kiu li rezonas ĝuste kontraŭ la opinio de Kalocsay: ke la koncernata vorto estu adverbo, sed ne — kiel mi opinius (?) adjektivo. Sed same kiel K. li opinias, ke la afero estas mistera al mi!

Koncize la afero do estas jena: Kalocsay defendas la *adjektivon* kaj opinias, ke mi erare preferas la *adverbon*.

Waringhien defendas la *adverbon* kaj opinias, ke mi erare preferas la *adjektivon*.

Kaj la vero?

Lingvistike la vorto estu adjektivo, kiel K. argumentas. Mi do ne kontraŭas lin; mi nur bedaŭras, ke li „legis” ion kion mi nenie skribis. Sed malgraŭ la korekteco de l' adjektivo, la adverba formo fariĝis la praktike uzata.

Tion lastan ni ĉiuj povas konstati.

Ŝajnas al mi rekomendinde, ke s-roj Kalocsay kaj Waringhien interpolemiku pri tiu interesa temo. Se permesitas konsili ion al ambaŭ lingvistoj; ili legu nur tion, kio estas skribita, kaj ne vidu regulojn kiuj ne ekzistas.

Kaj dume mi, restante neŭtrala, sci-volas pri la rezulto. G.J.D.

sur pli altan ŝtupon, de kie ili havis novan, pli vastan perspektivon.

Tre sekvoriĉa estis la ideo konservi la parolon per iaj pli daŭremaj signoj. El ĝia efektiviĝo rezultis, ankaŭ jam sufiĉe frue, la skribarto, alia maniero konkretiĝi la ideojn en simboloj. Ambaŭ metodoj, parolo kaj skribo, ĉiu kun siaj specialaj avantaĝoj, kiuj cetere sin reciproke kompletigas, fariĝis kaj restis ĝis hodiaŭ la du ĉefaj kolonoj de la tuta intelekta evoluo. Aliaj esprimiloj, ekzemple muziko kaj pentroarto, ĉiam ludis multe malpli gravan rolon. Kaj la moderna tekniko ne sole ne ŝancelis tiujn malnovajn kolonojn de la kulturo, parolon kaj skribon, sed eĉ firmigis ilin, grave plivastigante ilian agokampon per la rafinitaj inventoj de radio kaj preso.

Mian esploron pri la fundamentaj premisoj de literaturo mi nun konsideras finita. La eltrovo de la presarto ne estis premiso en tiu senco, ke sen ĝi literaturo ne povus ekzisti, sed ĝi almenaŭ kaŭzis la aktualan grandegan disvastiĝon de literaturaj produktoj, kiuj antaŭe estus atingintaj nur kelkajn privilegiulojn.

(Daŭrigots)

## POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

De wijzen van het werkwoord.

Dit zijn de verschillende vormen, waarin een werkwoord kan voorkomen. In het Nederlands zijn deze vormen onregelmatig. Dit geeft vele studerende moeilijkheden bij het vertalen in Esperanto. Men late zich echter niet leiden door de Nederlandse vormen, maar wel door de betekenis van de zin; wordt deze begrepen, dan is het niet moeilijk de juiste vorm in Esperanto te vinden, aangezien iedere wijs in deze taal zijn eigen vorm heeft.

### 1. De onbepaalde wijs (infinitivo).

Bij een werkwoord in deze wijs is er geen sprake van een werkelijke handeling, deze wordt slechts genoemd, b.v. lopen, spelen, zingen. Deze wijs gaat in Esperanto uit op de letter *i*: *kuri, ludi, kanti*.

### 2. De aantonende wijs (indikativo).

Hier is sprake van een handeling, die werkelijk wordt verricht (tegenwoordige tijd), verricht is (verleden tijd) of verricht zal worden (toekomstige tijd). De uitgangen voor deze wijs zijn respectievelijk *as, is en os*.

### 3. De voorwaardelijke wijs (kondicionalo).

Met deze wijs drukt men een handeling uit, die niet tot stand komt, kwam of zal komen; hier is sprake van een voorwaarde, waaraan niet voldaan kan worden, b.v. Als ik geld zou hebben, zou ik een mooi boek kopen. De voorwaarde (geld bezitten) ligt in de bijzin (als ik geld zou hebben) opgesloten, men drukt echter tevens uit dat aan deze voorwaarde niet kan worden voldaan, zodat de handeling (kopen) in de hoofdzin genoemd, niet in vervulling kan gaan. Deze wijs gaat uit op *us*, b.v.: *Se mi havus monon, mi acetis belan libron*.

Nog enige voorbeelden: Als ik moed zou hebben (voorwaarde: moed hebben), zou ik weigeren dat te doen. *Se mi havus kuraĝon, mi rifuzus fari tion*. Als het warmer zou zijn (voorwaarde: warmer zijn), zou ik gaan zwemmen. *Se estus pli varme, mi irus por naĝi*.

Men veronderstelle na deze voorbeelden nu niet dat de Nederlandse vorm voor de voorwaardelijke wijs wordt gevormd met de woorden *zou, zoudt* of *zouden*, men zegt meestal: Als ik geld had, zou ik een mooi boek kopen of zelfs: Als ik

geld had, kocht ik een mooi boek. Dit verandert echter niets aan de betekenis en deze zin wordt, evenals het eerste voorbeeld in Esperanto vertaald met de vorm voor de voorwaardelijke wijs, n.l. *us*.

Hoezeer de Nederlandse vormen ons kunnen misleiden bij het vertalen, bewijst het volgende voorbeeld: Hij beloofde, dat hij bij mij zou komen. Hier vindt men de uitdrukking *zou komen*; deze heeft echter niets te maken met de voorwaardelijke wijs, dit is aantonende wijs en moet dus vertaald worden met een der tijdsvormen en wel met *os*. Dit is een indirecte rede, de directe rede zou zijn: *mi venos al vi*. Nog in enkele andere gevallen gebruikt men in Esperanto de vorm der voorwaardelijke wijs, n.l.:

Als beleefdheidsvorm,

b.v.: Zoudt u zo goed willen zijn, mij even te helpen? *Ĉu vi bonvolus helpi min?* Zoudt u mij de weg kunnen wijzen? *Ĉu vi povus montri al mi la vojon?*

Bij onzekerheid,

b.v.: Zou hij wel komen? *Ĉu li venus?* Zou het wel goed zijn? *Ĉu estus bone?*

Bij een verzwegen voorwaarde,

b.v.: Zou jij zo iets kunnen doen? (verzwegen voorwaarde: als jij in zijn plaats was) *Ĉu vi povus fari ion tian?* Hoe zou jij gaan? (als je op reis moest) *Kiel vi irus?* (slot volgt)

Ter vertaling. Opgave 5.

Als ik niet zo moe zou zijn, ging ik met u mee. Zou vader nog ziek zijn? Als wij konden, zouden wij iedere avond studeren. Hij beloofde mij, dat hij zijn vader een brief zou schrijven. Zou dat geen goede functie voor kameraad Meijer zijn? Als ik morgenavond vrij ben, kom ik. Velen leerden Esperanto, als zij maar genoeg studiezijn hadden. Als ik kon, kwam ik ook. U zoudt geen fouten maken, als u de les goed bestudeerd had. Zullen wij uitgaan? Als men de hond niet geslagen had, zou hij niet gebeten hebben.

Vertaling van opgave 3.

Mia avo diris, ke li baldaŭ venos<sup>1</sup>). Johano asertis, ke lia<sup>2</sup>) hundo estas pli granda ol mia<sup>3</sup>). La<sup>4</sup>) patrino supozis<sup>5</sup>), ke la patro estas hejme. Kiam Johano venis hejmen<sup>6</sup>), la patrino vidis, ke li estas<sup>7</sup>) falinta. La prezidanto proponis, ke la kunveno okazu<sup>8</sup>) la sekvontan tagon. La ĉarpentisto demandis al sia servisto<sup>9</sup>), ĉu la ŝranko jam estas preta. La servisto promesis, ke ĝi estos preta antaŭ la kvina horo<sup>10</sup>). Montrigis, ke li estas prava<sup>11</sup>). Mi vidis la lokon, kie la viro estis falinta<sup>12</sup>). Li deziris<sup>13</sup>), ke oni fermu<sup>14</sup>) la pardon.

## LA BIBLIO EN ESPERANTO

S-ro Butler en Kingston-on-Thames sendis al ni bonvenan informon pri la Esp. traduko de l' Biblio. Ni publikigas ĝin ĉi sube, kvankam iom koncizigita pro nesufiĉa spaco.

Mi permesas al mi fari klarigon, ĉar estas kutime paroli pri la „brita“ Biblio, kaj trakti ĝin kiel „nezamenhofan“. Jen tamen la faktoj: Zamenhof komencis traduki la Biblion multajn jarojn antaŭ ol li finis la tradukon. Intertempe lia opinio pri dubaj punktoj ŝanĝiĝis, firmiĝis, kaj liaj lastaj verkoj ne ĉiam konformiĝis al liaj unuaj tradukoj.

Kelkaj homoj en Anglujo provizis la sumon de £ 2.000, parte por pagi al Zamenhof honorarion, parte por helpi al la eldono. Dum la milito oni sukcesis transdoni la monon al Z., kio certe faciligis liajn lastajn jarojn, kaj kun malfacilo venigi lian manuskripton al Anglujo, kie ĝin presigis la Brita kaj Alianda Biblia Societo.

La manuskripto estis kopio, maŝinskribita, ĉu de Zamenhof aŭ de lia filino Lidja, mi ne scias. Estas kompreneble, ke en verko unuhoma, rapide farita dum premo de milita tempo, troviĝis misaĵoj, des pli en kopio, kie troviĝas eblaĵoj de miskopio, ellaso k.s.

Laaŭ la reguloj de la Biblia Societo oni kondiĉas, ke por presigo de manuskripto respondeca kaj fidinda komitato certigu, ke la traduko estas ĝusta. Por tio oni fondis komitaton el kompetentaj esperantistoj, hebreistoj, kiuj devis prepari

la tekston por presigo, aldoni ellasaĵojn kaj fari necesajn ĝustigojn. Al tiu komitato Z. konfidis la finpretigon de lia traduko. Li mem petis, ke oni komparu liajn lastajn tradukojn kun la unuaj por unuformigi la tuton. Kaj li mem donis al la komitato gvidon kaj instrukcion. Jen ekzemplo: komence li skribis pri la 12 *gentoj*; poste li mem korektis: *triboj*. Li korektis *kulturi* al *kultivi*, (libro) *kolono* al *kolumno*, *aro* al *grego* k.s. Li petis, ke la komitato konformigu la tradukojn en la unue tradukitaj libroj al tiu en liaj lastaj tradukoj, kaj ke la komitato trastudu la proprajn nomojn kun la celo ilin unuformigi.

En la komitato troviĝis i.a. la Akademianoj J. M. Warden kaj W. Bailey. Ne estas eble scii precize kion Z. skribis, ĉar en la presitaj libroj estis sendubaj mispresoj kaj eraroj, sed oni tamen povas diri, ke la presita teksto tre verŝajne estas tia, kia ĝi estus, se finpretigita de Z. mem.

Estus interese eldoni paralelan tekston: la originalan kaj la korektitan, sed tio eble kostus £ 5.000. La originalo tamen estas zorge konservata en Skotlando.

M. C. Butler.

### REDAKCIA PETO

Kiu el niaj legantoj aŭ redakciaj kolegoj povas havigi al ni aron da terminoj pri piedpilkado? Ni tre bezonas! En nia redakcia komitato neniu piedpilkas.

1) Niet: *venus*; men moet zich niet van de wijs laten brengen door het Nederl. woord *zou*; dit is indirecte rede; de directe rede zou immers zijn: *mi venos baldaŭ*. 2) Niet: *sia*; dit wijst een onderwerp in de derde persoon als de bezitter aan en kan zelf dus niet in een onderwerp voorkomen. In deze zin is *lia hundo* onderwerp; men verzuime niet de zinnen eerst te ontleden, hierdoor worden veel fouten voorkomen. 3) Overbodig is: *la*; *mia* bepaalt reeds welke hond bedoeld wordt. 4) Niet zonder lidwoord; hier is sprake van een bepaalde moeder. 5) Juister dan: *pensis*. Ook: *opiniis*. 6) Niet zonder richtings-N. 7) Niet: *estis*; de directe rede zou zijn: *li estas falinta* (is gevallen). 8) Niet: *okazos*; hier heeft men te doen met een aanvoegende wijs, in het werkwoord *proponi* ligt een wens opgesloten. Men leze eens aandachtig een verslag van een congres of vergadering. 9) Juister dan: *servanto* dit ge-

bruike men bij gevallen waar geen sprake is van een beroep, in de zin wordt een timmermansknecht bedoeld. 10) Niet: *kvinan horon*; dit is een bepaling met voorzetsel (*antaŭ*) en van een richting is geen sprake. 11) Ook: *pravas*. Niet: *pravis*; de directe rede zou zijn: *li pravas*. 12) Niet: *tombinta*; het werkwoord *tombi* als vertaling voor *vallen* komt voor in „Unua libro“ van Dr. Z.; later heeft hij dit vervangen door *fali*, evenals: *vinki (venki)*, *erari (vagi)*, *vaksi (kreski)*, e.a. Niet: *estas falinta*; men heeft hier niet te doen met een indirecte rede. 13) Niet: *postulis*; *postuli* = eisen. 14) Niet: *fermas*; een directe rede kan ook gebiedende wijs zijn, in de zin is deze: *oni fermu la pordon*.

C. v. B. en M 6, E.R.M. en S. 8, Astor 9, P.W.W. en G. 9, A.A.D. en Z. 8, Stelano 7, R.J. en A. 6, Jo 7, S. v. W. en R. 5, B.J. en A. 7, J.B. en G. 8.



## DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 6. Vertaal in Esperanto en leer de woorden die u niet kent.

Een zoek naar de Amsterdamse diertuin (*zoologia gardeno*).

De diertuin is een van de bezienswaardigheden van Amsterdam. Hij is bekend onder de naam „Artis”. „Artis” is een afkorting van de Latijnse zinspreuk (*devizo*) „Natura Artis Magistra”, hetwelk betekent: „De natuur is de leermeesteres („natuur” is in het Nederlands vrouwelijk, heeft in Esp. echter geen geslacht, dus „instruisto”) der kunst”. Het is een prachtige tuin, en wie hem ooit bezocht in het voorjaar, als het jonge, frisse gebladerte en de veelkleurige bloemen er het aanschijn (*aspekto*) van een paradijs aan geven, zal altijd met genoegen aan dit bezoek terugdenken (*rememori*). Achter de ingang bevindt zich aan de rechterzijde de z.g. „kinderboerderij” (*porinfana bieno*). Men kan er vrij (*senĝene*) binnentreden. Vooral de kinderen stellen het zeer op prijs (*tre ŝatas*) die „boerderij” te bezoeken. Na binnentreden te zijn, bevinden zij zich dadelijk te midden van vele dieren. Een ezel, kalveren, bokken, geiten, zeugen met biggen, schapen, eenden, ganzen, konijnen, een grote hond, zij allen zijn zeer tam en laten zich aanhalen. Begerig strekken zij hun halzen uit om het voedsel te grijpen, dat hun wordt aangeboden. Statisch (*majeste*) staat de ooievaar aan de oever van de vijver, waarin prachtige zwanen zwemmen. Groentebedden en bloemperken (*legom-kaj florbedoj*) vol vlinders, hommels en bijen vragen onze aandacht. Maar laten wij nu de kinderboerderij verlaten.

Ons doel zij niet de verschillende dieren verblijven vlug voorbij te lopen, maar te trachten iets te begrijpen van het gedrag en de levenswijzen der dieren. Als wij de dieren en hun handelwijzen aandachtig gadeslaan (*observi*), kunnen wij veel leren en begrijpen. Vóór alles moeten wij er ons van bewust zijn (*ni konsciu*), dat dieren geen mensen in dierenhuiden zijn. (Wordt vervolgd.)

Vertaling van opgave 4.

LA DOMO, EN KIU LOGAS (fino).

Ni nun vizitu la loĝoĉambron (familian ĉambron). Same kiel en la kuirejo kaj ĉambron. Same kiel en la dormoĉambroj la planko estas en la dormoĉambroj la planko estas en la mezo de la ĉambro kuŝas sur tiu linoleumo la tapiŝo. En la mezo de la ĉambro aŭ antaŭ la fenestroj staras rektangula tablo, kovrita

per tablotapiŝo. Antaŭ la fenestroj pendas kurtenoj. Super la tablo pendas lampo aŭ lustro. Kelkaj seĝoj kaj du foteloj aŭ brakseĝoj invitas nin por ek-sidi (sidiĝi). Murhorloĝo aŭ kamenhorloĝo informas nin pri la tempo. Ĉe unu el la flankaj muroj staras ĉambra bufedo, post kies vitraj pordetoj oni povas vidi karafojn, glasojn, telerojn k.t.p. En kelkaj loĝoĉambroj oni povas trovi divanon, skribotablon kaj libroŝrankon. Murpapiro kovras la murojn. Sur la muroj pendas kelkaj pentraĵoj aŭ bildoj (gravuraĵoj). Super la kameno troviĝas spegulo. Forno aŭ fajrujo utilas por varmigi la ĉambron dum la vintro. En kelkaj domoj oni trovas centran hejtadon. Nuntempe oni trovas en multe da loĝoĉambroj ankaŭ radio-aparaton aŭ pianon.

Vertaling van opgave 5.

LA PRINTEMPO KOMENCIGIS.

Marto estas la monato, en kiu okazas la transiro de la vintro en la printempon. La 21an de marto la printempo komen-cigis. Tiu 21a de marto estas rimarkinda tago, same kiel la 21a de septembro. Tiam ĉie sur nia tero la tago daŭras tiom (tiel, same) longe, kiom (kiel) la nokto. La printempo estas la sezono de la renaskiĝo. Kvankam ventegoj kaj pluvo ankoraŭ ofte memorigas nin pri la malagrabloj de la vintro, ni tamen sentas en la atmosfero ion, kio anoncas al ni, ke la severa sezono estas forpasinta (forpasis). La burĝonoj krevas, kaj la junaj freŝverdaj folioj disfaldiĝas.

Post la galante kaj la flava erantiso, kiuj jam floris en (dum) la vintro, ni vidas, ke multnombraj plantoj (kreskaĵoj) sinsekve ekornamiĝas per floroj. La ulmo floras per brunruĝaj floretoj. La amentoj de avelarbo, saliko, alno kaj poplo konfidas sian polenon al la vento. Abeloj kaj burdoj rekomencis sian labo-ron kaj, se la vetero ne estas tro mal-milda, jam en marto ni povas vidi ilin serĉantaj nutraĵojn en la ankoraŭ mal-multnombraj floroj. La formikoj komen-cas rekonstrui la parte ruiniĝitajn nestojn. Kiam la suno brilas, kelke da papilioj jam aŭdacas montri sin. La migraj birdoj, kiuj forlasis nin dum la aŭtuno, grandparte revenis kaj komencas konstrui aŭ rekonstrui siajn nestojn. Fine en la mateno kaj malfrue en la vespero ni aŭdas la belsonan fajfadon de la merlo. La kverelemaĵo paseroj estas tre okupitaj, serĉante la necesan nestmate-rialon. Ardeoj, kormoranoj kaj multe da aliaj birdoj serĉas branĉojn kaj branĉetojn

## POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 7. Vertaal in Esperanto:

In Zuid Afrika is een H.B.S.-er van 16 jaar, Pieter van Jaarsveld, het gesprek van de dag geworden. Hij bezit namelijk het vermogen om hetgeen onder de grond verborgen is, aan te wijzen. Hij zelf noemt het „zien”. Hij wijst niet alleen aan waar water verborgen is, maar ook waar zich diamanten, goud, steenkool en andere kostbare mineralen bevinden. Doctoren en natuurkundigen hebben hem vele proeven laten doen, maar zij staan nog steeds voor een raadsel. Iedere keer, dat hij onder de grond „ziet”, kost het hem, volgens het dagblad „Trouw”, waaraan deze mededelingen ontleend zijn, grote concentratie, na afloop waarvan hij uitgeput is en een verblindende hoofdpijn heeft. Voor een mijnbouwmaatschappij is de jonge man al naar Tanganyika gevlogen, waar hij op overtuigende wijze diamantlagen heeft aangetoond. Hij kan echter nooit zeggen hoe diep de verborgen stoffen of het water zich bevindt.

„Nederl. Studieblad”.

Vertaling van opgave 4.

„Mahatma<sup>1)</sup> la Granda Animo<sup>2)</sup>, tia<sup>3)</sup> la milionpopolo<sup>4)</sup> de Hindio<sup>5)</sup> nomis la homon<sup>6)</sup>, kiu, kiel neniu alia kontribuis al ĝia<sup>7)</sup> politika vekigo, kiu donis enhavon kaj direkton al ĝiaj naciaj sentoj. Kiu krom tio ĉiam batalis por tio, ke ĉi tiuj sentoj ne degeneru<sup>8)</sup> al malfekunda nacia sektemo<sup>9)</sup>, ĉar<sup>10)</sup> li volis servi ne nur Hindion, sed prefere<sup>11)</sup> la tutan homaron. Kaj kiu havis la kuraĝon meti<sup>12)</sup> en la praktikan politikan batalon<sup>13)</sup> tutē novan elementon<sup>14)</sup>, la komprenon<sup>15)</sup> „Satyagraha<sup>16)</sup>”.

Ne estas facile trovi nederlandan ekvivalenton por ĉi tiu vorto, por ĉi tiu kompreno<sup>17)</sup>, kiu kvazaŭ formas la kernon de la politika aktiveco de Gandhi kaj kiun li aplikis tiom konsekvence, ke li pretis eĉ morti por ĝi. Ĝi ne estas nur pasiva rezisto<sup>18)</sup> kiel oni ofte opinias<sup>19)</sup>; ĝi estas pli.

„Het Vrije Volk”.

1) Dit vreemde woord, gegeven in de na-

por konstrui siajn nestojn, ĉar alproksimiĝas la kovotempo. Sturnoj per komikaj teniĝo kaj sonoj anoncas de la tegmentoj, ke nun estas printempo. Ĉio estas streĉita por elerveskanta vivo. Reptilioj kaj amfibioj vekigaĝas el la dumvintro dormado. La lacerto sunumas. La

tionale taal, laten wij zo staan. De verklaring volgt er direct achter.<sup>2)</sup> Bijstelling van „Mahatma”, dus ook in dezelfde naamval. 3) Ook: *tiel, tio, tiu*. 4) Ook: *Milionhoma popolo, popolo de milionoj*. 5) Het land van de hindoes, dus: *Hindio*, met een *H*. 6) Ook: *la viron*. 7) Niet: *sia*. Het onderwerp van deze bijzin is niet gelijk aan dat van de hoofdzin. 8) De uitdrukking van een wens. 9) Ook: *sektismo*. 10) Ook: *tial ke*. 11) Ook: *plej antaŭe*. 12) Ook: *eŝovi, enkonduki*. 13) Ook: *agadon*. 14) Ook: *principon*. 15) In dezelfde naamval als „elementon”, want het staat daar ter vervanging, ter verduidelijking van dit woord. 16) Zie onder 1. 17) Ook: *koncepto*. 18) Ook: *kontraŭstaro*. 19) Niet: *akceptas*. Ook: *supozas*.

Beoordeling: Astor 7.

## L. P. KONTROLATA!

Ne ektimu, leganto, L.P. ne aperas *sub* kontrolo. Tiom grava la afero ne estas. Provizore la kontrolo okazas nur *post* apero de l' gazeto.

Kun ĝojo ni konstatas regule, ke L.P. kontentigaĝas la lingvajn bezonojn de niaj legantoj. Krom kotentajn legantojn L.P. tamen atingas ankaŭ niajn Esperantajn antipodojn.

Ni konstatis, ke post pritrakto de iu gramatikajo — kio precipe okazas laŭ demandoj el la legantaro — s-ro De Hoog en sia „Kristana Gazeto” kutimas posttrakti la saman aferon, kritikante ĝin tiom radikale, ke ni sentas sin plene venkitaj!

En la aprila numero de K.G. s-ro de H. dediĉas preskaŭ tutpaĝan kritikon al nia kelklinia klarigo pri la esprimo „je nia bedaŭro”, aperinta jam antaŭ... du jaroj. Al serioza kaj digna kritiko ni pretas prezenti nian kontraŭnan vidpunkton, sed ne al malica ĉikanado. Kiu konas la ironian kaj nesinceran kritikmanieron de s-ro de H. — ekz. el lia recenzo pri „Esperanto 60 jara” — komprenas, ke „je lia bedaŭro” ni ne inklinas polemiki, malgraŭ la intereseco de la temo mem, kiu meritas pli seriozan pritrakton. De honesta oponento ni atendas almenaŭ, ke li ne tordu la sencon de niaj vortoj. Kiu ŝatas nur „*enfant-terribli*”, faru tion senĝene kaj... senefike.

viro de la akva salamandro paradas per sia belega printempa vesto. Inter la lemno oni jam trovas la ranfrajon. Ĉio prepariĝas por la generado. La vintro estas venke batita, la suno ĉiutage pli kaj pli fortiĝas. La nova vivo komenciĝas!

## BESTOKRIOJ EN ESPERANTO

(kaj kelkaj aliaj bestaj sonoj).

La abelo zumas.

La akcipitro kriĉas.

Kelkaj akridoj ĉirpas.

La alaŭdo kantas kaj triladas.

La anaso kvakas, kvekas.

La ansero gagaas kaj grakas.

La azeno iaas.

Birdoj pepas, pipas, kantas, flutas.

La bovo muĝas.

Cikadoj ĉirpas.

La cikonio klakas.

La ĉevalo henas.

La elefanto trumpetas.

La grilo ĉirpas.

La hieno hurlas.

La hundo bojas, hurlas, ululas.

La kanario kantas, triladas, pepas.

La kapro mekas, mekmekas.

La kato miaŭas, ronkas, (kat)zumas (spinnen).

La virkoko kikerikas, kokerikas.

La kokino klukklukas, klukas, tokas.

La kokido pepas, ĉirpadas.

La kolombo rukulas, kurekuras, kveras (kiri).

La korvo grakas.

La kukolo kukuas, kukukas.

La kulo zumetas.

La leono muĝas; kolera leono ronkas kaj murmuregas.

Kelkaj lokustoj ĉirpas.

La lupu hurlas kaj ululas.

La meleagro glugluas.

La merlo flutas kaj siblas.

La mevo krias.

La muso cincas, pipas.

La muŝo zumas.

La najtingalo kantas.

La pasero kvivitas, pepas.

La pavo krias.

La pigo babilas.

La porko gruntas, ronkas.

La rano kvakas, kvakvakas, kvekas.

La serpento siblas.

La strigo ululas, uhuas.

La sturno pepadas.

La ŝalo meas, bebeas.

La turdo kantas.

La turto kukuruas, kveras, ridas.

La tigro muĝas, ronkas, murmuregas.

La urso grumblas, murmuregas.

La vanelo kvikas, pepegas, kvivitas.

Kolektis Chr. F. W. Slijper.

### ĈU NE?

Naar aanleiding van het artikel in L.P. van Maart schreef k-do Chr. F. W. Slijper ons het volgende:

„Ĉu vi kredas tion? Ne (= bijwoord). „Ĉu vi kredas tion? Jes (= tussenwerpsel).

„K-do Van Scheepen, dat wil er niet bij me in. Als „ne” in het eerste voorbeeld een bijwoord is (en daar zijn we het over eens, nietwaar?), dan is „jes” in het tweede voorbeeld, waar het absoluut dezelfde functie verricht, ook een bijwoord — dat is, geloof ik, logisch.

Zeker, in P.V. staat: Jes. Interjekcio. Maar in de voorbeelden, die dan volgen, is „jes” ongetwijfeld een bijwoord. Want een bijwoord verricht niet alleen de dienst van bijwoordelijke bepaling bij een (niet zelfstandig) woord, maar komt ook voor als bepaling van een zin: Zeker, je hebt gelijk. Inderdaad, dat is de oplossing. Zowel „zeker” als „inderdaad” kunnen we hier vervangen door „ja”. En zowel „zeker” als „inderdaad” zijn bijwoorden; dus is ook „ja” een bijwoord. Het is naar mijn mening dan ook logisch en grammaticaal volkomen verantwoord om een zinnetje als „Li jes faris tion” te gebruiken als antwoord op de bewering „Li ne faris tion”. Ik zou deze constructie in dergelijke gevallen zelfs willen

aanbevelen, omdat deze manier van zeggen een geheel andere gevoelswaarde heeft en daardoor veel sterker en beslister de bewering „Li ne faris tion” weerlegt dan het wat slappe „Jes, li faris tion”.

Neen, k-do Sl., toch zijn wij het aan het begin van uw betoog reeds niet eens. Hier hebt u de zaken omgedraaid. Het is zo: als „jes” hier een tussenwerpsel is, dan is „ne” het in dit analoge geval dus ook. Want behalve als bijwoord kan „ne” ook voorkomen als tussenwerpsel.

In de door u aangehaalde voorbeelden „Zeker, je hebt gelijk” en „Inderdaad, dat is de oplossing” vertalen we „zeker” en „inderdaad” met de bijwoorden „certe” en „efektive”.

Echter zult u bij nadere beschouwing merken, dat we in deze gevallen steeds te doen hebben met een afgeleid bijwoord (in Esp. dus altijd eindigend op „e”), dat een verkorte uitdrukking weergeeft. „Efektive” = en realo; „certe” = en certa maniero, sen dubo. We kunnen er dus een bepaling met een voorzetsel van maken. De niet afgeleide bijwoorden kunnen dergelijke bepalingen niet op de zo juist besproken manier weergeven. Daar de oorspronkelijke bijwoorden dus geen rol kunnen vervullen met betrekking tot de gehele zin, is het logisch, dat

## PROBLEMOJ SOLVENDAJ.

La artikola serio sub tiu ĉi titolo estis ĝenerale bonvene akceptata de niaj legantoj, kion pravas pluraj simpatiesprimoj, eĉ el eksterlandoj. El tiuj simpatiesprimoj montriĝas kelkaj faktoj: 1e, kelkaj legantoj bedaŭras, ke ne pri ĉiu punkto de l' gramatiko ekzistas unueco de opinioj; 2e, se unueco estas atingebla, nia lingva instanco, L.K. kontribuu al ĝi, almenaŭ per konsiloj; 3e, kie diversaj opinioj havas ekzistorajton, neniu gramatikisto aŭtoritate trudu sian opinionon, sed lasu spacon ankaŭ por alies opinioj; 4e, oni ne facilanime nomu erara ĉion, kio ne akordas kun la propra opinio; 5e, estas dezirinde, ke lingve sperta esperantisto estu informita pri la diversaj opinioj koncerne iun gramatikajon.

Por kontribui al tio lasta iuj legantoj urĝe petis, ke en L.P. ni traktu kelkajn tiajn problemojn, lumigante ilin el diversaj vidpunktoj. Ni volonte konsentas pri tio, kvankam en la malvasta kadro de nia revueto la pritrakto de tiaj aferoj devas esti ne tro detala. En proksima numero ni traktos la demandon: ĉu adjektivo aŭ adverbo?

## RESPONDOJ AL ASTOR.

„Mulluij“ („Homoj en milito“, 19—8) estas kunmetita el „mult“ kaj „iuj“ (*multaj iuj*) = menige(n). Same oni povas formi ankaŭ „mulliu“ = menigeen. „Aliiel“ (H.e.m., 71—26) estas formita

el „ali“ kaj „iel“ (*laŭ alia maniero*) = anderszins.

„Aliiam“ (H.e.m., 178—15), same el „ali“ kaj „iam“ (*aliatempo*) = op een andere tijd.

Tiuj ĉi vortkombinoj estas korektaj, kvankam malofte uzataj. Kontraŭfundamentaj estas la formoj „aliel, aliam, alies“ k.s., kiuj prezentas sesan korelativan serion, kreitan ne de Zamenhof mem, sed de Sentis. La dua „i“ en la regule formitaj vortoj neniel ĝenas ĉe la elparolo, ĉar preskaŭ ne aŭdiĝas.

„Nave volbi“ (H.e.m., 68—22) = als het schip van een kerk overwelden (*volbi kvazaŭ navo*).

„Kreivo“ (L.M., 35) = scheppingsvermogen. La aŭtoro uzis neoficialan sufikson „iv“ = kio povas...

Per „ekstrovertismo“ (L.M., 34) la aŭtoro supozeble celas: la econ, ke karakteraj (internaj) trajtoj agrable efikas eksteren.

## BIRDONOMOJ EN ESPERANTO.

Jam ofte naturamikoj inter la legantoj petis al ni, ke ni donu en L.P. liston da birdonomoj. Por sufiĉe fidinda kaj detala listo ni tamen bezonis kompetentan sciencistan helpon. Nun ni ĝojas, povante komuniki, ke ni trovis k-don drs. G. F. Makkink, biologon, preta kompili por ni tian liston. Ĝi enhavas nur la plej oftajn nederlandajn birdojn, sed estas jam sufiĉe vasta. En la proksima numero ni komencos ĝian parton-post-partan publikigon.

## WERFT NIEUWE ABONNÉS VOOR ONS BLAD!

de woordjes „jes“ en „ne“ in die gevallen geen bijwoordelijk karakter dragen, doch dan de plaats innemen van het tussenwerpsel. De voorbeelden in P.V. aangehaald onder „Jes“ zijn dus ongetwijfeld juist. J. van Scheepen.

De beantwoording van het artikeltje van k-do Sl. hebben wij aan k-do v. Sch. overgelaten. Toch willen wij de bewering van k-do Sl., als zou „jes“ logisch verantwoord zijn in een zin als „li jes faris tion“ niet zonder commentaar laten. Juist logisch moeten wij dit even herzien:

„Li faris tion“ is een bevestigende zin. De werking „fari“ kan hier, ontkend worden door „ne“, of verzwakt door „eble, verŝajne, supozeble“, maar ook versterkt. In de Nederl. zin „hij heeft het gedaan“ dient „wel“ ter versterking om de voorafgegane ontkenning „hij heeft

het niet gedaan“ te weerleggen. Nu is het de vraag, of in Esp. „jes“ als versterking kan dienen evenals ons „wel“. Dit is o.i. niet het geval: „jes“ bevestigt slechts, maar versterkt niets. Als er in een zin die al bevestigend is dus niets te bevestigen valt, is „jes“ volmaakt overbodig en een zuiver pleonasme.

Of „jes“ hier gevoelswaarde heeft is een andere zaak. Gevoel is geen logica. Gevoelswaarde heeft „wel“ is het Nederl. zeker, en de Nederl. esperantist kan zich moeilijk los maken van dit „wel“, waarom de beginner dit dan ook graag verstaalt door „jes“, wat evenwel voor de niet-Nederlander onbegrijpelijk is. We hebben „jes“ als zodanig nog nooit in vertalingen van niet-Nederl. herkomst aangetroffen. Als correcte versterkingen voor dit „wel“ komen in aanmerking „certe, nepre sendube, tamen, malgraŭe“.

Red.